

Enhavo

- **anoncoj**

Financa helpo por orfaj lernantoj; Novaj varoj en la retbutiko; ESF serĉas administranton; Poezia konkurso; Esperanto featured in the journal *INDECS*; Korespondi deziras; Novaj libroj eldonitaj kun ESF-subteno; Ĉu vi volas gastigi la LK-on en 2017?

- **loke**

Senkrokodila semajnfino en Novjorkio

- **How to acquire Esperanto**

de la centra oficejo - Vilĉjo Harris

As an adult student of Esperanto, you can acquire the language while you are learning it. The trick is to find **interesting** reading and listening materials and enjoy them.

- **Lingvaj rajtoj en malliberejoj**

lingvaj rajtoj - Fred Meyer, III

En 2015 okazis problemo pri lingvaj rajtoj en miĉigana prizono. Jam de longa tempo, laboristoj tie tradukis ne-anglalingvajn leterojn senditajn al malliberuloj por gardi kontraŭ malpermesitaĵoj. Tamen en la printempo de 2015 la prizonestro decidis, ke oni ne plu rajtas uzi Esperanton por korespondi.

- **Pasporta Servo - ĉu ja venkita?**

vojaĝe tra la mondo - Roy McCoy

Juna komitatano de TEJO aplombe anoncis antaŭ kelkaj jaroj ke oni devus rezigni pri la Pasporta Servo – precipe ĉar la poste aperinta *Couchsurfing* plene venkegis ĝin. Nu, post lastatempaj spertoj miaj en Usono, mi povas diri ke tio ne estas vera.

- **La hundido kaj la ŝtelistoj**

rakonte - Johano Bentley

Unu tagon, antaŭ longe, kiam mi unue komencis mian bestkuracistan praktikon, mi eniris mian ekzamenejon kaj trovis malkutiman aferon: tie sidis maljuna kliento kun granda metala peco de aŭtomobila motoro sur la genuoj.

- **leterkesto**

Volontuloj bezonataj por Duolingo

- **Ultramale**

senintenca esperantaĵo? - Mara Rockliff

Io por diri kiam oni opinias ne nur *male*, ne nur *tre male*, kaj eĉ ne nur *malege*...



Financa helpo por orfaj lernantoj

Kiel nuna Direktoro de la organizo *Infanoj ĉirkaŭ la Mondo* [<http://icxlm.org>] fondita de Charlotte KOHRS, mi komunikigas kun pluraj geinstruistoj de Esperanto en Afriko. Ĉar iliaj gelernantoj ne havas komputilojn, mi sendas al ili ekzemplerojn de la libretoj, kiujn Charlotte kreis. Ili bezonas ankaŭ aliajn materialojn, ekzemple paperon, kraĵojn, plumojn. Kompreneble ili ofte ankaŭ bezonas monon por ekipaĵo por lernejoj, ekzemple skribotabloj. Unu fojon mi eĉ sendis uniformojn por futbala teamo, kiu uzas la nomon Esperanto.



Sed nun estas nova peto pri kiu mi bezonas helpon. Japanino JASUO Mariko, specialisto pri “La rezolucio de konfliktoj en Afriko”, vizitis lernejon en Ruando. Ŝi vidis la tre bonan laboron kiun ZAWADI Mignonne faras rilate al la lernejo, kaj rimarkis, ke ŝi eĉ povas varbi helpantojn. Sekve ŝi indikis, ke ŝi mem estas preta sendi **aŭtobuseton** de Japanujo, sed nur se Mignonne povus pagi **2500** usonajn dolarojn por akiri ĝin kiam ĝi alvenos en Ruando. S-ino Jasuo mem eĉ pagos la altan sendkoston.

Ĝis nun Mignonne mem eĉ povis kolekti **1000** usonajn dolarojn de speciala apuda esperantista helpanto en Ruando, kiu bone scias pri la bona laboro kiun ŝi faras kun la lernejo. Ŝi petas de mi la alian 1500 usonajn dolarojn. Ŝi bone komprenas, ke mi mem ne povos sendi tiom da mono. Sekve ŝi proponis, ke mi petu financan helpon de aliuloj. Do mi nun faras tion.

Feliĉe estas bona maniero kontribui. Infanoj ĉirkaŭ la Mondo (IĈLM) estas suborganizo de Esperanto-USA. Tial kontribuoj estas impost-subtraheblaj! Bonvolu sendi ĉekon markitan por IĈLM al **Esperanto-USA, 1500 Park Avenue, Suite 134, Emeryville CA 94608**. Mi supozas, ke vi povus ankaŭ kontribui per la retbutiko. Se IĈLM ricevos 700 usonajn dolarojn antaŭ la fino de Aprilo, mi mem kontribuos la aliajn 800, kiujn Mignonne bezonas por akiri la buseton por la lernejo en Ruando.

Dankon pro via grava helpo.

— Ron GLOSSOP

Novaj varoj en la retbutiko

Ĉiuj el la ĉi-subaj estas elŝuteblaj sondosieroj de klasikaj rakontoj. La dosieroj kostas po \$2.00 por nemembroj, sed estas senpagaj por membroj.



- **ALPA ROZO** [<http://bit.ly/1PhW4DQ>] de N. NORDENSVAN.
- **DOKTORO NEKELMO** [<http://bit.ly/1PhW4Ua>] de Roksano.
- **VENĜO** [<http://bit.ly/1PhW6LR>] de I. ŜIRJAEV.
- **DU PINARBOJ** [<http://bit.ly/1PhW4Ui>] de T. JUNG.
- **LA METROPOLO MALSATAS** [<http://bit.ly/1PhW4Um>] de J. BAGHY.
- **KIEL MIHOK INSTRUIS ANGLE** [<http://bit.ly/1PhW6M0>] de J. BAGHY.
- **LA ĜENDARMO DEĴORAS** [<http://bit.ly/1PhW7PO>] de R. SCHWARTZ.
- **BAPTO DE SONORILO EN MULMONT** [<http://bit.ly/1PhW7PQ>] de R. SCHWARTZ.
- **APUD STACIDOMO VICTORIA** [<http://bit.ly/1PhW7PU>] de K. ROBINSON.
- **KAMARADO BOJKO** [<http://bit.ly/1PhW7PZ>] de M. LJUBIN.

Mendu de *Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530*, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

ESF serĉas administranton

La fonduso *Esperantic Studies Foundation*

(Montrealo) kaj la novjorka oficejo (por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj) de Universala Esperanto-Asocio serĉas part-timpan aŭ volontulan administranton kapablan prizorgi la financon administradon de ESF kaj la Novjorka oficejo.



Kvalifikaĵoj: kapablo pri librotenado (prefere kun sperto pri *QuickBooks* aŭ preteco ĝin lerni), kapablo skribi Esperanton, akurateco. Preferata, kvankam ne necesa, estus loĝanto de la novjorka aŭ montreala regiono.

Tiu persono kunlaborus kun Joel AMIS, la direktoro de ESF, kaj Humphrey TONKIN, la reprezentanto de UEA ĉe UN. Temus pri ideala laboro por emerito au suplementa laboro por homo kun alia regula posteno. Salajro dependa de horoj laborataj kaj de kvalifikaĵoj. Skribu al <tonkin@hartford.edu>.

— *Jenja AMIS*

Poezia konkurso

Revenas *Poezio el ĉiuj ĉieloj*, konkurso starigita de italo Giuseppe CAMPOLO, kun la subteno de la komunumo de Sankta Anĝelo de Brolo (Mesino - Sicilio) kaj de Itala Esperanto-Federacio. Rajtas partopreni ĉiuj poetoj ĉie, per poeziaĵoj en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj.



Oni devas sendi retroŝte (en formato *Word*) al <samideano@hotmail.it> nur unu poeziaĵon ne pli longan ol 50 (kvindek) versoj. La verkoj devas esti neeldonitaj kaj neniam premiitaj antaŭe. **Verkoj devos alveni antaŭ la 21-a de Marto.** La tuta anonco kun aliĝilo estas legebla rete [<http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoPoemojIII.html>].

La ĉi-jara konkurso riĉiĝas per nova fako: *Romanoj el ĉiuj ĉieloj*, verkoj tradukitaj en Esperanton el ĉiuj ajn lingvoj.

La premioj estos mono, platoj kaj libroj. La premiada ceremonio okazos en la komunuma

Teatro en Sankta Anĝelo de Brolo (Sicilio, Italujo), la 18-an de Oktobro 2016.

— *Nicola MORANDI, Pistoja Esperanto-Grupo*

Esperanto featured in the journal *INDECS*

The Phenomenon of Esperanto is the title of a special issue of the journal *Interdisciplinary Description of Complex Systems (INDECS)*, published recently in Croatia. The collection, edited by Professor Humphrey Tonkin and Dr. Veronika Poór, is issue 2 of volume 13 of *INDECS* (2015) [http://indec.eu/2015/indec_13_2.pdf]. The collection is in English with summaries in Croatian.



Twelve articles provide a comprehensive scholarly approach to the international language Esperanto, including a review of the literature by Detlev Blanke (Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin) and a broad introduction by Humphrey Tonkin (University of Hartford). Sabine Fiedler (University of Leipzig) provides a contribution on Esperanto phraseology, Wim Jansen (University of Amsterdam) examines Esperanto grammar, and Duncan Charters (Principia College, USA) explores the teaching of Esperanto.

The functionality of Esperanto as a planned language is addressed in four articles. Ilona Koutny (Adam Mickiewicz University, Poland) asks whether complexity can be planned, Federico Gobbo (University of Amsterdam) examines the use of Esperanto in machine translation, and Detlev Blanke and Wera Blanke (Gesellschaft für Interlinguistik) explore the history and potential of Esperanto as a language for scholarly communication. Humphrey Tonkin asks how research on planned languages can be applied to language planning in general.

In examining the role of Esperanto in the flow of ideas in early twentieth-century Japan, Sho Konishi (Oxford University) offers a specific analysis of a particularly interesting question in the history of ideas, namely how Esperanto and related ideas of linguistic democracy have influenced thought and

politics in various parts of the world.

The question of the size and vitality of the movement for Esperanto is explored in two articles leading to very different conclusions. Krunoslav Puškar (University of Zagreb) looks at the core beliefs of the declining traditional Esperanto movement in Croatia, while Amri Wandel (Hebrew University) examines the rapid worldwide expansion of Esperanto on the Internet, revealing a sharp split between “traditional” structures and the new approaches to Esperanto and its use taken by more youthful learners and users unaffiliated with traditional Esperanto organizations.

INDECS is published in Zagreb by the Croatian Interdisciplinary Society with support from the Croatian Ministry of Science, Education and Sport.

The articles can be accessed online [<http://www.indecs.eu>] and the volume is available in paper form from the Universal Esperanto Association [<http://www.uea.org>].

— *Humphrey TONKIN*

Korespondi deziras

Mi estas itala esperantisto, 41 jaraĝa, oficisto en kultura instituto. Mi ŝatus korespondi kun aliaj esperantistoj. Al mi plaĉas la historio kaj la lingvoj, antikvaj kaj modernaj.

Ivan ORSINI,
<ivarpas@yahoo.it>



Novaj libroj eldonitaj kun ESF-subteno

Du novaj libroj, kies eldono estis subvenciita de ESF, debutis pasintjare ĉe la Universala Kongreso, kaj nun haveblas en la reta katalogo de UEA [<http://katalogo.uea.org>].

UEA en konscio de esperantistoj
[<http://katalogo.uea.org>]



[<http://katalogo.php?inf=9195>], de Zbigniew GALOR kaj Jukka PIETILÄINEN, estas detala sociologia esploro pri la Esperanto-movado. Ĝi daŭrigas kaj kompletigas la sociologiajn verkojn de Peter FORSTER, Frank STOCKER kaj Nicolas RAŠIĆ. La ideo de la esploro naskiĝis dum la 93-a UK en Roterdamo, kaj la enketado komenciĝis okaze de la UK en Bjalistoko. La unua parto de la libro prezentas la rezultojn de tiu kvanta esploro: ĝi skizas portreton de la respondintaj esperantistoj, interalie, rilate al la Esperanto-kulturo, motivoj interesiĝi pri Esperanto, opinioj pri UEA kaj la UK-oj, UEA-membreco (forlaso, reveno, tipoj de membroj), ktp. La aŭtoroj prezentas la bildon de UEA el la perspektivo de FLAM (SWOT)-analizo (analizo de fortoj, malfortoj [“lamaĵoj”], avantaĝoj kaj minacoj), kaj ili prikomentas la kontraŭdiron inter la internaj kaj la eksteraj celoj de la organizo. La dua parto de la libro traktas la imagojn pri UEA en pli larĝa sociideologia kunteksto: la interligo de Esperanto kun socialismo kaj kapitalismo, interkomunika problemoj kaj ideologio, kaj, fine, lingva imperiismo. La verkon kompletigas impona listo de elektitaj publikaĵoj pri sociologio de Esperanto.

Gvidlibro tra Esperanto [<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9191>], de Aleksandro S. MELNIKOV, estas populara referenca libro pri aspektoj de la kultura vivo de esperantistoj. Ĝi enhavas klarigojn de vortoj kaj esprimoj komunaj al anoj de la Esperanto-movado, sed malfacile kompreneblaj ekster tiuj rondoj ĉar ili aludas al specifaj kulturaj trajtoj de la Esperanto-komunumo. Ekzemple, la vorto *krokodilo* estas difinita kiel “Esperantisto, kiu parolas en nacia lingvo ene de la Esperanto-medio” kaj *kabei* estas “fari kiel [la verkisto] Kabe, kiu, estinte tre aktiva kaj eminenta esperantisto, subite kaj tute forlasis la movadon.” Ankaŭ listigitaj estas ĉefaj mallongigoj de la titoloj de Esperanto-organizaĵoj, priskriboj de Esperanto-fenomenoj (kongresoj, renkontiĝoj, literaturaj titoloj, titoloj de Esperanto-periodaĵoj), rolantoj en la Esperanto-movado, kaj amaso da aliaj foje esoteraj detaloj. La verko estas frukto de plurjara kompilado kaj plenigas gravan lakunon en la esplora literaturo.

Plenaj detaloj:

- *UEA en konscio de esperantistoj*. Zbigniew GALOR, Jukka PIETILÄINEN. KAVA-PECH.

Dobřichovice. 2015. 167 paĝoj. Prezo: 15.00 €. ISBN: 9788087169551.

- *Gvidlibro tra Esperantio. (konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj).* Aleksandro S. MELNIKOV. Rostov-na-Donu. 2015. 527 paĝoj. Prezo: 39.00 €. ISBN: 9785986151472.

Ĉu vi volas gastigi la LK-on en

loke

Senkrokodila semajnfino en Novjorkio

ROĈESTRO, NOVJORKIO — Dek naŭ personoj el kvin urboj partoprenis en la Senkrokodila Semajnfino en Januaro. Estis bona miksaĵo de spertuloj kaj novuloj... de junuloj kaj maljunuloj... kaj multaj en la mezo. Ĝi estis pli sukcesa ol mi atendis ol eĉ revis, kaj mi ĝojas ke ne nur ne okazis neĝostormo, sed ke la vetero estis tre milda kaj agrabla. Dankon al ĉiuj kiuj venis.




Partoprenantoj antaŭ kajo ĉe lago Ontario.

The event was kicked off in sort of a rolling fashion — mostly due to a miscommunication. Some people met at my house. Some met just before the talk. Some met at the restaurant later for lunch. I think

2017?

Kie okazos la kongreso en la jaro 2017? La LKK daŭre serĉas lokan grupon kiu volas gastigi la Landan Kongreson.



Se vi kaj via grupo volus gastigi la Landan Kongreson en la jaro 2017, bonvolu sendi retmesaĝon al la komitata estro Ron GLOSSOP ĉe <rglossop@mindspring.com>.

this worked out to give people a chance to meet in small groups before ending up in a larger group.

After lunch, we returned downtown to take a closer look at the *Airigami Balloon Adventure*, then a walk to the river to see the Sister Cities Bridge and the Aqueduct. (As well as *The Wings of Progress* sculpture, which we renamed “La Flugiloj de Facila Vento.”)

Saturday evening was a party of sorts at my house where we ended up not playing any games, but we played a lot of music and chatted quite a bit. (I don’t know about anybody else, but I was ready for a rest at that point.)

Sunday breakfast, then a walk on the Ontario Pier, a quick trip to Wegmans, and then some slot car races to wrap it up.

So — did we really go the whole weekend “sen krokodilo”? No, not even close. A few people had just taken a crash course in Esperanto before the weekend and I didn’t want them to get lost. (I was informed that at least one person didn’t start the crash course till **after** the weekend.) For my part, I got to speak Esperanto quite a bit — both with experienced speakers, and to those new to the language. Everybody was pushed a little, but not too far. That’s really the point.

— *Thomas ALEXANDER*

Lingvaj rajtoj en malliberejoj

Fred MEYER, III

En 2015 okazis problemo pri lingvaj rajtoj en la prizono *Cooper Street Correctional Facility*, kiu situas en Jackson, Miĉigano. Jam de longa tempo, laboristoj ĉe la prizono tradukis ne-anglalingvajn leterojn senditajn al malliberuloj por gardi kontraŭ malpermesitaĵoj. Tamen en la printempo de 2015 la prizonestro decidis, ke oni ne plu rajtas uzi Esperanton aŭ la hispanan por korespondi.

Iom poste, la decido ŝanĝiĝis: la malliberejo komisiis al tradukfirmao *Linguistica International* serĉi malpermesitaĵojn en la leteroj. Do malliberuloj denove rajtis elekti siajn lingvojn laŭplaĉe; ili reakiris homan rajton.

Kial la ŝanĝiĝo? Sinjoro Jeff DELL estas malliberulo kiu eklernis Esperanton per la koresponda kurso de Ellen EDDY. Jeff volis praktiki la lingvon, do li komencis korespondi kun iu en Ukrainujo, kaj ankaŭ kun mi. Li progresis bone. Kaj kvankam li neniam aŭdis Esperanton, li decidis instrui la lingvon al aliaj malliberuloj. Poste la prizonestro ŝanĝis la regulojn pri permesitaj lingvoj, kaj la prizono rifuzis peri niajn leterojn en Esperanto.



Jeff DELL

Jeff do sendis anglalingvan leteron al mi, klarigante la situacion. Mi respondis opiniante, ke la malpermeso estas kontraŭleĝa laŭ la Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiun Usono ratifis.

Laŭ Artikolo 2 de la Deklaracio, ĉiuj rajtoj validas same por ĉiuj homoj, sen diferencigo laŭ lingvo. Laŭ Artikolo 12, neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian korespondadon. Kaj laŭ Artikolo 27, ĉiuj rajtas partopreni la kulturen vivon de la komunumo. Kiel esperantistoj bone scias, lingvo estas grava parto de kulturo.


Post pli ol monato, Jeff sendis alian leteron: li diris, ke la hispanparolantoj kaj li protestis, kaj tial la prizonestro komisiis al tradukista firmao aldoni al ĉiu letero anglalingvan resumon, por ke la anglalingvaj gardistoj povu ekscii pri la enhavo. Jeff cetere petis min kontroli, ĉu la firmao efektive havas tradukiston kiu komprenas Esperanton. Mi telefonis al la firmao... kaj post iom da esploro, la deĵoranto tie respondis jese. *Linguistica International* havas Esperantan tradukiston!

Ni devas danki la malliberulojn pro ilia kuraĝo kaj gratuli ilin pro la sukceso. Estas bone, ke la prizonestro faris rajtigan decidon. Estas bone ankaŭ, ke iu esperantisto laboras por la tradukfirmao.

Dum ni estas feliĉaj pri la bona rezulto ĉi-kaze en Miĉigano, ni nur bezonas rigardi al la tenda malliberejo en konteo Mariposa en Arizono por vidi malrespekton al lingvaj rajtoj.

Ni esperantistoj ofte diras, ke ni estas favoraj al lingvaj rajtoj. Ni ankaŭ diras, ke ni volas utiligi Esperanton. Tiu ĉi estas fekunda agadkampo. Kaj ni havas historion en la gulagoj.

Kiuj estas la lingvaj rajtoj de malliberuloj en via ŝtato aŭ lando?



Fred MEYER III

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten.

Amikeco inter homoj kaj la disvolviĝo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

<f3meyer@texoma.net>

Pasporta Servo - ĉu ja venkita?

Roy McCoy

Juna itala esperantisto en la komitato de la junulara organizaĵo TEJO aplombe anoncis antaŭ kelkaj jaroj ke TEJO devus rezigni pri sia Pasporta Servo

[<http://www.pasportaservo.org>] – precipe ĉar la poste aperinta *Couchsurfing* plene venkegis ĝin. Nu, post lastatempaj spertoj miaj en la Pacifika Nordokcidento, mi povas diri ke tio ne estas vera.

En pasinta Julio mi estis okupanta la gastĉambron de nevino mia kaj ŝia familio en Portland, Oregono. La gepatroj de ŝia edzo estis venontaj por kelkaj tagoj, kaj kvankam eblis ke mi tiam dormu surplanke aŭ en tendo en la malantaŭa ĝardeno, mi estis ĉiuokaze dezirinta fari kromvojaĝon pli norden (ankaŭ pro neatendita varmego en Oregono), kaj mi do volis profiti la okazon por fari tion. Kvankam mi estis uzinta la gastigajn servojn *Airbnb* kaj *Couchsurfing* dum vojaĝado post mia emeritiĝo ĉe la Centra Oficejo de UEA, kie mi laboris kiel prespretigisto kaj redaktoro dum 26 jaroj, mi preferas Pasportan Servon pro diversaj kialoj, interalie plia esperantista amikeco, plia respondemo de la PS-gastigantoj, kaj – mi libere konfesas – malplia kosto.

Mi do konsultis PS-on – kies retejon denove funkcias ekde pasinta Novembro, sed mi ankaŭ portis ekzempleron de la lasta presita eldono de 2011, kaj eĉ havis ĝin en mia komputilo ĉar mi prespretigis tiun – kaj trovis ja afablajn gastigantojn en lokoj al kiuj mi volis iri.

Unue estis Ellen EDDY en Olympia, Vaŝingtonio, virino kiu certe estas konata al ĉiu usona esperantisto. Montriĝis ke ŝi kaj ŝia edzo loĝas apud bela lago sude de tiu urbo, tiel ke facile eblis eskapi la varmon simple enirante en la akvon, kion mi tre volonte kelkfoje faris. Ni ankaŭ ĉiuj faris amuzan ludon pri malnovaj muzikaĵoj, kaj bone manĝis kradrostaĵon kuiritan de la edzo, antaŭ ol mi grimpis sur mian biciklon kaj reveturis al la urba stacidomo por pludaŭrigi la vojaĝon.



Olympia, Vaŝingtonio.

(Foto © [<https://creativecommons.org/licenses/by-nc/2.0/deed.eu>] Orin BLOMBERG)

Poste en Vankuvero, Brita Kolombio – urbo kiu ricevis Esperantan nomon kiam Universala Kongreso okazis tie en 1984 – mi konatiĝis kun novaj tiulokaj esperantistoj. Precipe mi tie gastis ĉe geedza paro alveninta antaŭ ne tre longe el Meksiko, Alejandro Mejía GREENE kaj lia edzino Olga, kiuj atendis bebon preskaŭ certe parolontan nian lingvon. Sed ankaŭ estis simile lastatempe alveninta norvega esperantisto, Espen STRANGER-JOHANNESSEN, kiu estis ĵus edziĝinta kun baratanino kaj ekloĝinta kun ŝi en nova apartamento, kio liberigis liajn studentajn ĉambrojn en la Universitato de Brita Kolombio, kie okazis la UK en 1984, kaj kiun mi do nun povis reviziti pli ol tridek jarojn poste. Mi povis viziti ankaŭ la nudistan plaĝon apude, kie UEA-direktoro Simo MILOJEVIĆ kaj Akademio-prezidanto John WELLS promenis inter surpriza nombro da aliaj senvestaj esperantistoj (sed ne mi, kiu nur aŭdis pri la afero poste) en la antaŭa okazo.

Fine estis tempo reiri al Portland, kion mi elektis fari laŭ Vankuvero-insulo, kie loĝas UEA-komitatano Wally DU TEMPLE kaj lia edzino, kanada UEA-ĉefdelegito Olga. Tie mi sukcesis bicikli tra ĉiuj kvar anguloj de Saanich-duoninsulo, daŭre ĝuante la perfektan veteron de la nordokcidenta

somero, krom aliaj belaj allogaĵoj kiel subĉiela koncerto en Victoria, la famaj ĝardenoj Butchart en Brentwood Bay, kaj la bela (nenudista) plaĝo proksime al la domo de Wally kaj Olga.

Do, ja ankoraŭ eblas vojaĝi pere de Esperanto, kaj Pasporta Servo ne estas vere venkita de *Couchsurfing*. Kiel mi sugestis supre, PS-gastigantoj pli emas respondi al loĝpetoj ol gastigantoj de

Couchsurfing, pri kiuj mi aŭdis ke necesas skribi al tridek aŭ kvardek da ili por ricevi unu inviton. Ankaŭ kelkaj esperantistoj ne respondis al mi, sed tio povas esti pro nuna malaktualeco de la PS-datenoj. Nova skipo nun alprenas la gvidadon de tiu ĉi tradicia gastiga servo de TEJO, kaj eblas esperi ke la ne plu aktivaj gastigantoj ne plu aperos en la retejo kaj presotaj eldonoj.

de la centra oficejo

How to acquire Esperanto

Vilĉjo HARRIS

Dr. Stephen Krashen [http://en.wikipedia.org/wiki/Stephen_Krashen] is a well-known educator in the United States who has published many books and articles about second-language learning.

Krashen distinguishes between *learning* a second language and *acquiring* it. Learning includes memorizing vocabulary and grammatical rules. Speaking or writing the language is hard work. Your mind is constantly monitoring your actions and correcting your efforts. When you write something, you have to go back and re-read it and correct the grammatical errors. When you speak, you say a phrase, and then immediately realize that you made an error, and then you repeat the phrase correctly.



Acquiring a second language (according to Krashen) is done by reading and listening to interesting and comprehensible material in the language. After you have read and listened enough, you can speak and write the language without thinking about the vocabulary or rules. This is the way children learn to speak a language (or two or three) before they start

school.

The two key concepts in acquiring a language are “interesting” and “comprehensible”. If the reading or listening material is not interesting, you will not pay attention. If the material is too difficult to be understood at all, you won’t acquire anything.

As an adult student of Esperanto, you can acquire the language while you are learning it. The trick is to find **interesting** reading and listening materials and enjoy them. The amount of reading material for beginners is limited, and the amount of listening material for beginners is even more limited, but you can find some in various Internet sites and specifically at the Esperanto-USA online store [<http://esperanto-usa.org/retbutiko/>].



Vilĉjo HARRIS

Vilĉjo estas direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA en Emeryville, CA.

La hundido kaj la ŝtelistoj

Johano BENTLEY

Unu tagon, antaŭ longe, kiam mi unue komencis mian bestkuracistan praktikon, mi eniris mian ekzamenejon kaj trovis malkutiman aferon: Tie sidis maljuna kliento kun granda metala peco de aŭtomobila motoro sur la genuoj.

“Doktoro”, li diris, “vi devas helpi min!” Li levis la metalon pecon kaj metis ĝin sur la tablon: *KLONK!* Ĝi estis sonoril-forma kovrilo por transmisiilo, kun truo ĉe la pinto de la “sonorilo”. El tiu truo etendiĝis torako kaj postaĵo de eta hundido. Ŝia kapo kaptiĝis ene.



“Mi ne povas eltiri ŝin”, li diris. “Mi provis dum la tuta tago, sed ŝia kapo nur ŝvelis. Mi timas, ke baldaŭ ŝi ne povos spiri!”

La vizaĝo de la hundido estis ja ŝvelinta. Ŝiaj okuloj estis tre ruĝaj, kaj ŝi spiris malfacile. Sed mirinde, tio ŝajne ne gravis al la hundido. Ŝia vosto gaje svingiĝis, kaj ŝi provis leki mian vizaĝon – kvankam ŝi eĉ ne povis levi la kapon. Ŝi provis ankaŭ boji, sed la premo ĉirkaŭ ŝia kolo permesis nur etan pepon. Malgraŭ ĉio, ŝi tute ne malkuraĝiĝis. Kaj kiam mi metis mian manon en la metalan pecon por palpi ŝian kolon, ŝi pepis eĉ pli. Ŝi estis la plej gaja mortanta hundido, kiun mi iam vidis. Kaj ŝi ja estis mortanta. Mi konstatis, ke se mi ne sukcesos liberigi ŝin tre baldaŭ, ŝi sufokiĝos.

Post la ekzameno, mi rimarkis ian nigran ŝlimon sur mia mano. Ankaŭ la maljuna viro rimarkis ĝin. “Nu, mi provis eltiri ŝin, sed ne sukcesis”, li diris. “Do mi verŝis nafton sur ŝin kaj provis denove. Sed ŝia kapo estis jam tro ŝvelinta.”

Mi rezignis pri mia propra plano pri lubrikaĵo, ĉar ŝi ne povus esti pli ŝlima ol ŝi jam estis. Kio pri distranĉo de la metalo? Mi havis mansegilon, sed eĉ post multe da peno mi sukcesis nur grati la eksteron. Trasegi ĝin postulus horojn, sed mi havis nur minutojn. “Se mi nur havus elektran segilon...” mi diris al mi.

Kvieta, ĝentila voĉo kun hispana akĉento aŭdiĝis el mia atendoĉambro: “Ĉu la hundido mortos?”

Mi turnis min al la voĉo, kaj rimarkis tre malmolaspektan, tatuitan junulon kun senemocia mieno. Li portis “band-kaptukon”. Entute li ŝajnis iom danĝera.

“Nu, se mi ne sukcesos eltiri ŝin aŭ tratranĉi tiun metalan pecon tre baldaŭ, jes – ŝi mortos”, mi respondis.

Li rigardis la plankon momente. “Eble mi konas iujn, kiuj povas helpi. Lasu mi telefoni.” En tiu tempo poŝtelefonoj ne estis facile haveblaj, do li uzis mian oficejan telefonon. Dum kelkaj momentoj li rapide parolis al iu hispanlingve. El la aŭdilo aŭdiĝis rido. Tamen li persistis, kaj post kelkaj aliaj rapidegaj vortoj, li turnis sin al mi: “Bone, ili helpos. Mi kondukos vin al la ĝusta loko. Sed lasu min paroli – vi diru nenion. Kaj Doktoro... estus bone se vi ne memorus la adreson poste, ĉu komprenite?”

Do mi, la maljuna kliento, kaj la tatuita junulo – li nomiĝis Alejandro – ni ĉiuj portis al mia ŝarĝaŭto la transmisiilan kovrilon kun la kaptita hundido. Mi kaj la hundido sidis sur la ŝarĝoplato. Alejandro stiris, kaj la kliento sidis apud li.

Ni veturis al tre malriĉa parto de la urbo, kie finfine ni haltis antaŭ mezgranda konstruaĵo kun granda rulpordo. Mi estis tre nervoza. Ŝajnis, ke Alejandro

kondukis nin al loko por aŭtoŝtelistoj – sekreta garaĝo kie oni malmuntas ŝtelitajn aŭtojn por vendi la pecojn.

Alejandro eniris tra normala pordo apud la granda rulpordo. Post kelkaj momentoj la rulpordo leviĝis. La suno brilegis ekstere, kaj mi ne povis vidi la tre malluman internon, sed mi aŭdis multe da batado kaj bruo. Kelkaj viroj malrapide eliris. Ili ĉiuj portis la saman specon de kaptuko kiel portis Alejandro, kaj ili ĉiuj havis multe da tatuaĵoj. Ili ŝajnis tre danĝeraj – kaj certe ne gajaj pri la alveno de mi kaj mia kliento.

Unu viro – ŝajne la ĉefo – alproksimiĝis kaj indikis per kapklino al la metala peco sur miaj genuoj. Mi ja memoris, kion Alejandro konsilis al mi: mi diris nenion. Mi nur malrapide turnis la pecon por montri la etan kapon de la hundido ene.

La viro etendis sian manon al la hundido, kaj ŝi malforte pepis kaj provis leki liajn fingrojn. Ŝia vosto svingiĝis unu-dufoje. Mi timis pro ŝia malforto; ne restis multe da tempo por ŝi. Mi fikse rigardis la ĉefon, kaj kun kvietaj, trankvila voĉo mi petis, “Ŝi mortos baldaŭ. Bonvolu – ĉu vi povas helpi?”

La ĉefo kapjesis. Lia severa mieno malaperis, kaj anstataŭis ĝin grandega rideto. Li turnis sin al la aliaj kaj krie anoncis: “NI SAVOS LA HUNDIDON!” Ĉiuj komencis rideti kaj ridi. Multe da hispanaj vortoj rapide flugis ĉirkaŭ mi, kaj du junuloj prenis la metalan pecon kun la hundido kaj portis ĝin en la garaĝon.

“Ĉu vi volas eniri?” demandis la ĉefo, tre ĝentile. “Estas tre varme hodiaŭ. Venu kaj sidiĝu en klimatizita ĉambro. Ni havas kokakolaon aŭ teon, se vi soifas.”

Ni eniris. Alejandro kaj tri aliaj junuloj laboris ĉe grandega elektra segilo. Ili volvis bantukon ĉirkaŭ la kapo kaj korpo de la hundido. Kiam ili komencis segi la metalon, la aero subite estis plena je fajreroj kaj kriĉanta bruo. Unu el la junuloj kuŝis sur la planko: Li karesis kaj parolis al la hundido, por ke ŝi ne timiĝu.

Alejandro laŭŝajne estis majstro pri tiu segilo. Ĉe ambaŭ flankoj de la metala peco li rapide segis ĝuste

ĝis la rando de la truo, sen penetri ĝin. Fine li prenis ĉizilon en unu mano kaj grandan martelon en la alia – li aspektis kiel kirurgo en operaciejo. Li ĉizis tre zorge. Aŭdiĝis laŭta krakado kaj la du duonoj de la metala peco defalis kun laŭta *KLONK!* Ĉiuj hurais laŭte.

Alejandro turnis sin al ni kun grandega rideto sur la vizaĝo. Nafto malpurigis liajn ĉemizojn kaj brakojn, sed tio ŝajne ne ĝenis lin. Li lulis la hundidon, kaj portis ŝin al ni: “Ĉu ŝi vivos, Doktoro?”

La ĉambro estis tute silenta dum la malmolaj junuloj atendis mian respondon. La okuloj de la hundido jam aspektis malpli ruĝaj, sed ŝia kapo estis ege ŝvelinta. Tamen ŝi tuj provis boji kaj leki mian vizaĝon. Ĉiuj el la severaspektaj junuloj ridis kaj hurais denove. La ĉefo reaperis, portante tekilon, limeopecojn, kaj salon. Ni ĉiuj celebris nian sukceson per kelkaj glutoj da tekilo.

Poste la ĉefo petis min skribi ion por li: la ciferojn sur la licencplatoj de miaj aŭtoj. Li diris, ke mi neniam plu devos timi pri ŝtelado.

Mi reveturis al mia kuracejo kun la kliento kaj ties hundido. Enirante duonebrie, mi vidis la malŝarĝitan vizaĝon de mia akceptistino.

“Mi estas tre gaja vidi vin denove”, ŝi diris. “Mi preskaŭ vokis policistojn. Kio okazis?”

Mi rakontis ĉion, eble kun iomete ebria voĉo, kaj ŝi ridis multe.

“Ŝajne mi devos nuligi la ceteron de via horaro por hodiaŭ, ĉu ne?”

Mi konsentis. Sentante la komencon de grandega kapdoloro, mi ridetegis kaj diris, “Certe mi havas la plej bonan laboron en la tuta mondo!”



Johano BENTLEY

Johano loĝas en Mobile, Alabamo. Kiel profesia bestkuracisto, li trovas sin inter sovaĝejo kaj civilizacio, inter bestoj kaj ties homoj. Foje la homoj estas pli sovaĝaj ol la bestoj – aparte kiam mono postuliĝas.

<johano.warden1@gmail.com>

leterkesto

Volontuloj bezonataj por Duolingo

Kelkcent mil parolantoj de la angla estas registritaj por studi Esperanton ĉe la retejo Duolingo [<http://duolingo.com>]. Sed kio pri parolantoj de aliaj lingvoj krom la angla?

Pensu pri kursoj por esperantistoj kiuj volas lerni la anglan, la hispanan, aŭ aliajn lingvojn. Ni estas komunumo de plurlingvaj homoj, ĉu ne? Do kial ne montri al la mondo, ke Esperanto povas esti ilo por lerni aliajn lingvojn? Por volontuli, necesas paroli Esperanton kaj nur unu alian lingvon. Do mi kuraĝigas vin helpi kun novaj kursoj ĉe Duolingo: ne nur por instrui Esperanton, sed por instrui aliajn lingvojn al Esperanto-parolantoj. Ju pli da homoj volontulas, des pli probable estas, ke Duolingo kreos

novan kurson.

Por volontuli, iru al la “Duolingo Incubator” [<https://incubator.duolingo.com/apply>].

— *Donald Arthur KRONOS*

Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



kolofono

Usona Esperantisto

Sendu kontribuaĵojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.




Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to an address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Ultramale

Mara ROCKLIFF



Jen malkonsenta vorto por tiaj okazoj, en kiaj la kutimaj kontraŭaj ekkrioj simple ne sufiĉas.

Multan dankon al Mara ROCKLIFF, kiu fotis la supran reklamon por kolonjakvo en Parizo.